

Wilhelm Müller,  
Ĉe put' antaŭ pordego

*tradukita de Joachim Gießner*

Ĉe put' antaŭ pordego  
jen staras la tili'.  
En ĝia ombro dolĉe  
ja ofte revis mi.  
Mi tranĉis karajn vortojn  
en ĝia kruda ŝel'.  
En ĝojo kaj doloro  
ĝi restis mia cel'.

Mi devis pretermigri  
dum nokta obskurec'.  
Mi fermis la okulojn  
en nigra malhelec'.  
Kaj kvazaŭ min vokante  
la branĉoj muĝas jen:  
"Ĉi tien vi nur venu  
kun via korĉagren'."

Malvarma vento blovis  
dolore kontraŭ mi.  
De l' kap' ĉapel' forflugis,  
ne turnis mi al ĝi.  
Nun malproksima estas  
mi for de la tili',  
sed vokas ĝi: "Nur venu,  
trankvilon trovos vi!"

...

Wilhelm Müller,  
Der Lindenbaum

Am Brunnen vor dem Tore  
Da steht ein Lindenbaum  
Ich träumt in seinem Schatten  
So manchen süßen Traum  
Ich schnitt in seine Rinde  
so manches liebes Wort  
Es zog in Freud und Leide  
Zu ihm mich immer fort

Ich muß auch heute wandern  
Vorbei in tiefer Nacht  
Da hab ich noch im Dunkel  
Die Augen zugemacht  
Und seine Zweige rauschten  
Als riefen sie mir zu:  
"Komm her zu mir, Geselle  
Hier findest du deine Ruh."

Die kalten Winde bliesen  
Mir grad ins Angesicht  
Der Hut flog mir vom Kopfe  
Ich wendete mich nicht  
Nun bin ich manche Stunde  
Entfernt von diesem Ort  
Und immer hör ich's rauschen:  
"Du fändest Ruhe dort."

...

Wilhelm Müller,  
Ĉe puto antaŭ l'urbo

*tradukita de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj)*

Ĉe puto antaŭ l' urbo  
jen staras la tili',  
en kies ombro dolĉe  
revadis ofte mi.  
Mi tranĉis en la ŝelon  
amsignojn pro memor';  
sopir' min tien logis  
en ĝojo kaj dolor'.

En lasta nokto pasis  
mi preter la tili',  
sed malgraŭ la malhelo  
okulojn fermis mi.  
Jen ĝiaj branĉoj muĝis  
kaj ŝajnis logi min:  
"Restadu, ho migrulo,  
ni trankviligos vin!"

La vento kontraŭblovis,  
ĉapelon ŝiris for.  
Sed pelis min antaŭen  
turmentoj de la kor'.  
Se plue mi vagadus  
eĉ ĝis la monda fin',  
la branĉoj ĉiam logus:  
"Ni trankviligos vin!"

...

*Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25) en 2001-11.*

*Arg-83-165 (2003-12-28 22:58:15)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro “Mia kanta-ro I”, kiun eldonis JOSEF SCHIFFER (Wilstorf-str. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio) en 2001.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 – †1827-10-01), publikigita 1822.*

*Arg-83-163 (2003-12-28 22:57:42)*

*Mi trovis tiun originan version en la TTT sub <http://ingeb.org/Lieder/AmBrunne.html>*

*Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj).*

*Arg-83-164 (2003-11-09 21:14:39)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la germana Esperanto-lernolibro “Post la kurso” de WILHELM kaj HANS WINGEN, sur paĝo 68. Sube estas indikite tie: “Laŭ L. E. Meier k. a.”. El tio oni povas konkludi, ke ĝi ne estas la origina tradukversio de L. E. MEIER kaj ke ĝi estas iom ŝanĝita de aliuloj, eble de la fratoj WINGEN mem.*